

Gazeto



Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

Fuente Obejuna

(Kordovo)

36-a Jarkolekto - Decembro 2022 - N-ro 127



Oktobro / Decembro 2022
Enhavo

- P. 03 Esperanto en Andaluzio.
- P. 06 Sevilo, eŭropa zepelina fin-stacio.
- P. 10 Edición del libro
125 años de esperanto en Sevilla.
La realización de un sueño.
- P. 14 Lingva Angulo: *Tial*, para explicar la causa de algo.
- P. 17 Poezia Angulo.
- P. 18 Nuntempa Vortaro:
Oliv-rikoltado.
- P. 20 Folioj por Praktikado.
- P. 25 Turismi en ...
Fuente Obejuna (Kordovo).
- P.29 Legu librojn en aŭ pri esperanto.
- P. 31 Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio: *Cristeto Rodríguez Aparicio. La kordova bohemia.*
- P. 33 $E=mc^2$ Scienca Angulo:
Nikotino, ĉu la nova mirakla drogo.
- P. 36 Flamenko: "*La Toná*".
- P. 38 Fervojista angulo: *La unua elektra fervoja linio en Andaluzio.*
- P. 40 Nun Ni. Junulara Paĝo.
- P. 42 Komikso.
- P. 48 Andaluzia kuirarto:
Farunaĵo kun frititaj pan-pecetoj.
- P. 50 Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio: *La tombo de la Doktoro Pastor en Utrero.*
- P. 52 Vorto-ludoj.

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910. Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Ánfora 6 5-D
29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86.
ISSN: 1576-0618.

DIRECTOR: Ángel Arquillos López
REDACTORES:
José María Rodríguez Hernández
Alejandro Burgos Escalante
COLABORADORES:
Ángel García del Río.

Sur la kovrilo:
Ĝenerala vidaĵo de Fuente Obejuna (Kordovo)



GRAVA DONACO AL LA BIBLIOTEKO DE LA MEZGRANDA LERNEJO ALMENERA EN VÉLEZ-MÁLAGA

Niaj gesamideanoj, Rafaela Urueña kaj Luis Hernández, decidis donaci grandan parton de sia E-biblioteko al loko aŭ grupo kiu povus profiti tiun materialon pli utile. Niaj valadolidaj amikoj estas esperantistoj de antaŭ pli ol 60 jaroj kaj ili decidis revivigi sian materialon profite al komencantoj.

La loko elektita estis la lerno-fako de la mezgranda lernejo Almenara en Vélez-Málaga (Malago). Tie, nia samideano Fabián Jiménez sukcesas organizi de antaŭ kelkaj jaroj kurson pri esperanto kaj eŭropaj valoroj kun akademia agnosko.

La libraro kaj materialo ricevita jam estas parto de la E-sekcio de la biblioteko de tiu malaga gimnazio kaj, espereble, lernantoj de la internacia lingvo ricevos utilon el ĝi.



D-ino Rafaela Urueña prelegas pri internaciaj aferoj dum Andaluzia Kongreso de Esperanto en Arundo. 2014.



Pakaĵo de libroj ricevita dank'al donaco de D-ino Urueña kaj S-ro Hernández

·PARTOPRENO DE ESPERANTISTAJ ASOCIOJ EN LA OMAĜO AL BLAS INFANTE.-

La pasintan 10-an aŭgusto 2023 okazis en Sevilo tradicia akto memore al Blas Infante. Pere de ĉi tiu evento, ĉiuj andaluziaj kaj sevilaĵoj estas kunvokitaj por memori la figuron de la Patro de la Andaluza Patrujo, sur la sama loko kie li mortis pafita je la komenco de la hispana civila milito. Tie, stariĝas monumento memore al Blas Infante.

Ĉi-jare Sevila Esperanto-Asocio kaj Andaluza Esperanto-Unuiĝo decidis partopreni, pere de ofero de buketo da floroj antaŭ la monumento kiu stariĝas sur la kilometra punkto 4-a de la vojo Sevilo-Karmono, ĝuste kie Blas Infante estis mortpafita en la jaro 1936.



Prezidanto de Sevila Esperanto-Asocio, S-ro José Roldán León marŝas por lasi florojn antaŭ la monumento al Blas Infante.

La prezidanto de Sevila Esperanto-Asocio, s-ro José Roldán León, kaj Antonio Rodríguez Gasch, estrarano de tiu asocio kaj ankaŭ de Andaluza Esperanto-Unuiĝo, partoprenis en la akto, kune kun reprezentantoj de dekoj da aliaj kulturaj asocioj. Ili profitis la omaĝon por sciigi al ĉiuj interesitoj pri la esperantisteco de Blas Infante.

Esperable venontjare ni denove partoprenos en la omaĝon.

PARTOPRENO DE ANDALUZOJ EN LA UNIVERSALA KONGRESO DE TORINO (Italio).-

En la itala urbo Torino okazis de la 29-a de julio kaj la 5-a de aŭgusto 2023, la 108-a Universala Kongreso de Esperanto. Partoprenis preskaŭ 1400 homoj el la tuta mondo, kompreneble inter ili kelkaj andaluzoj.



Mariló, de Malago, respondeciĝis pri la informa budo de Hispana Esperanto-Federacio. Malagaj sekaj vin-beroj estas donacitaj al ĉiuj interesitoj.



Ángel Arquillos kaj Carlos Spinola en la kongresejo de Torino kun eksterlandaj samideaninoj.



Sevilo, eŭropa zepelina fin-stacio

La 24-an de aprilo 1929, kiam ĉio jam estis aranĝita por la inaŭguro en Sevilo de Iberoamerika Ekspozicio, flugis super la urbo la zepelino D-LZ127. La aer-ŝipo flugis super Sevilo dum kelkaj minutoj je ne tro granda alteco, tion atestas dekoj da fotografaĵoj faritaj dum tiuj instantoj.

Verdire, ĉi tiu flugo estis nur la unua de kelkaj pliaj realigitaj kiam la urbo sin proponis kiel aernavigada fin-stacio en la vojaĝo Eŭropo-Ameriko. En Hispanio ankaŭ aliaj urboj deziris tiun lokon, ĉefe Barcelono kaj Kartageno, ĝi estis la tiel nomata "batalo de la Atlantiko".



Zepelino supeflugas Sevilon

Ni ne devas forgesi, ke la pioniro de la uzo de direkteblaj balonoj en Hispanio estis Emilio Herrera, hispana militisto, andaluzo kaj esperantisto. Jam en la jaro 1903, li ricevis la titolon de militista specialisto pri balonoj, li tuj pripensis la utilecon de ĉi tiuj aparatoj okaze de militaj operacoj. En la

jaro 1920, li fariĝis konsilisto de la societo Colón, kies ĉefa inicianto estis la reĝo Alfonso la 13-a kaj kies celo estis atingi la kunlaboron de la germana entrepreno Zeppelin por la konstruo de tiuj balonoj en Hispanio. La ĉef-inĝeniero de tiu kompanio, Hugo Eckener, estis granda amiko de Emilio Herrera.

La sevila urbodomo tuj komprenis la utilecon konstrui balon-stacion en la urbo, kiu povus esti uzata en la vojo Eŭropo en Amerikon, eĉ la nomo proponita estis evidenta: "Eŭropa Fin-stacio". La unua loko pripensita estis Tablada, tamen inĝenieroj de la Zeppelin-kompanio malprobis la projekton, pro la apudeco de tiu loko al la rivero Gvadalkiviro. Do, fine oni decidis konstrui tiun stacion sur bieno havigita de fama sevila taŭro-ludisto. Sur tiu loko, ne tro malproksime de la nuntempa sevila flughaveno, troviĝas nun la kvartalo "Sevilla Este" (Orienta Sevilo).

La unua surteriĝo de direktebla balono en tiu flughaveno okazis la 16an de aprilo 1930, poste, aliaj 17 fojoj zepelinoj venis en Sevilon, kvankam ne ĉiam tiu aerŝipo surteriĝis.

Bedaŭrinde, la manko de politikaj apogoj kaj ekonomiaj rimedoj malebligis la projekton kaj Sevilo ne fariĝis tiu fin-stacio de la balonaj vojaĝoj inter Eŭropo kaj Ameriko, krome la terura akcidento de la zepelino Hindenburg en Usono en la jaro 1937 provokis la definitivan forgeson de ĉi tiuj flug-maŝinoj.



Poŝtmarko eldonita en Hispanio omaĝe al generalo Emilio Herrera



Zepelino flugas super la Placo Hispanio, konstruita dum la Ibero-amerika Ekspozicio de la jaro 1929 en Sevilo



MONATO estas internacia magazino pri politiko, moderna vivo, kulturo, scienco, ekonomio ktp, aperanta ĉiumonate kaj eldonita en la internacia lingvo esperanto.

Abon-tarifo por Hispanio (jare):

Aer-sendado	Normala poŝto	Ricevita en la komputilo
68 €	66 €	37 €

Peranto en Hispanio, kontaktu kun:
ueaperanto@esperanto.ac



Esperanto
Ponto inter popoloj



Ponto "La Barqueta" en Sevilo, finkonstruita en la jaro 1992

ALIĜU AL Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Post solvi kelkajn problemojn kun la banko, nia asocio reaktivis la konton kiun ni aranĝis por ricevi jarajn aliĝojn.

La ekzisto de ĉiuj asocioj, ankaŭ de AEU, dependas ĉefe de la kunlaborado de la membroj, pro tio ni invitas al vi pagi la kotizon por la jaro 2023 aŭ/kaj 2024.

La jara kotizo estas 20 € kiun vi povas pagi ĉe:
Caixabank IBAN ES74 2100 7234 6713 0048 0698
Asociación Andaluza de Esperanto



HAZTE SOCIO DE LA Asociación Andaluza de Esperanto

Después de algunos problemas con el banco, nuestra asociación vuelve a activar la cuenta que mantenemos para el cobro de cuotas.

La vida de cualquier asociación, también la nuestra, depende principalmente de la colaboración de sus socios, por eso te invitamos a que abones la cuota correspondiente al año 2023 y/o 2024.

La cuota anual es de 20 € que puedes ingresar en
Caixabank IBAN ES74 2100 7234 6713 0048 0698
Asociación Andaluza de Esperanto

Edición del libro

125 años de esperanto en Sevilla

La realización de un sueño.

En el año 2011 se celebró en Sevilla el 16º Congreso Andaluz de Esperanto. Se quiso recordar en ese evento el primer centenario de la creación del Grupo Esperantista Sevillano, primera asociación de la capital hispalense que tuvo como objetivo difundir la entonces joven lengua -de apenas 20 años- creada por el Doctor Zamenhof.



Juan de Dios Montoto y Antonio Rodríguez Gasch, veteranos esperantistas sevillanos, lanzaron en ese congreso una propuesta: recoger en un libro la historia de esos cien primeros años del movimiento esperantista en Sevilla. La empresa no parecía especialmente difícil, afortunadamente se disponía de los originales de los libros de actas de aquel grupo, por lo que resultaría fácil seguir sus avatares, al menos hasta finales de los años '20 del siglo pasado. Por otra parte, la mención del idioma y de sus hablantes en la prensa sevillana de aquella época hacía posible la búsqueda en las hemerotecas de la ciudad de artículos, noticias e informaciones que tuvieran relación con el esperantismo sevillano.

Además, si nos referíamos al movimiento esperantista en la ciudad de Sevilla a partir de los años 70 del siglo pasado, la memoria personal de los más veteranos esperantistas, entre quienes se encontraban los que habían lanzado la propuesta de redactar el libro, hacía posible recoger todo lo que se vivió en esa época en torno a la Academia Sevillana de Esperanto, creada en el año 1976.

Pero lo que parecía una empresa no demasiado difícil poco a poco se fue complicando. Cada noticia que se encontraba, cada personaje que se estudiaba conducía a otro hecho, a otra persona de la que no se tenía noticia y de la que merecía la pena explorar. Así, la redacción del libro se convirtió en una inmensa tela de araña, en la que las líneas de investigación se sucedían

una tras otra, y omitir alguna de ellas haría perder calidad a la obra. Todo era interesante y todo era digno de darlo a conocer.



Juan de Dios Montoto y Antonio Rodríguez presentan el proyecto de elaboración de un libro sobre la historia del esperanto en Sevilla, durante el 16º Congreso Andaluz de Esperanto. Sevilla 2011

Se fueron sucediendo así, episodios que apenas se conocían, como los de aquellos esperantistas centro-europeos, que pensaban asistir al Congreso Universal de Esperanto que iba a tener lugar en París en el año 1914 y que no pudieron volver a sus países, porque Europa estaba en guerra y tuvieron que ir a un país neutral y allí se quedaron varios años, algunos de ellos en Sevilla; o como el gobierno español becó a una maestra sevillana para asistir a un congreso internacional de esperanto y, a su vuelta, organizó un curso de esperanto en un colegio para niñas en la capital sevillana en el año 1934; también la historia de aquellos esperantistas que continuaron con la difusión del idioma tras la guerra civil, a pesar de que toda idea internacionalista no era del agrado del nuevo régimen político. También la historia de Antolín Colmenar, cuyo verdadero nombre era Tomás Caspe, quien tras escapar de una prisión en la posguerra, puso tierra de por medio y se instaló en Sevilla, en una historia muy similar a la del Conde de Montecristo de Alejandro Dumas; o la de Felipe González del Pino, un maestro sevillano represaliado tras la guerra, quien pidió permiso a las autoridades educativas para impartir clases del idioma esperanto en centros públicos de enseñanza a comienzos de los años 70; o como nota curiosa la del Padre Félix Arana, antiguo sacerdote católico y disidente de la Iglesia de El Palmar de Troya, quien utilizaba el esperanto para transcribir sus reflexiones teológicas.

Tantas y tantas historias, algunas de ellas trágicas, como la de los esperantistas que sufrieron represión o fueron asesinados durante la guerra

civil, y que había que contar, lo que provocó que la redacción del libro se fuera retrasando muchos años después de aquella idea inicial que surgió en 2011.

La propuesta de celebrar en Sevilla el 81º Congreso Español de Esperanto en octubre de 2023 se convirtió en una magnífica excusa para agilizar la tarea de redacción del libro. Nuevos colaboradores se sumaron a la idea: Manuel Ramírez Cepeda y José María Rodríguez Hernández -la colaboración de Manuel Ramírez fue decisiva para culminar el trabajo, en tanto que su experiencia como catedrático y su participación en la Academia Sevillana de Esperanto a finales de los años 70 y la década de los 80 suponía un aporte de calidad y de conocimiento para la redacción del libro-.

Y por fin el libro apareció. La editorial Círculo Rojo, una de las más prestigiosas de Andalucía, se comprometió con el proyecto y así, casi en el último minuto antes de la inauguración del Congreso Español de Esperanto, los primeros ejemplares de la obra se recibían en Sevilla.



Manuel Ramírez, Antonio Rodríguez, José M^a Rodríguez y Juan de Dios Montoto presentan el libro "125 años de esperanto en Sevilla", durante el 81º Congreso Español de Esperanto. Sevilla, octubre 2023

Por fin aquel sueño que se gestó en 2011 se ha hecho realidad y la obra no desmerece la espera. En sus 300 páginas podrá el lector conocer todas las historias que se han apuntado anteriormente y muchas más, que demuestran que el esperanto en Sevilla está lleno de personas que hicieron posible que el sueño de un joven médico polaco que quiso unir el mundo por medio de una

nueva lengua, se hiciera realidad en una ciudad muy lejana a la Polonia del Doctor Zamenhof.

Gracias a este libro ya siempre se tendrá memoria de esos primeros cien años del esperanto en Sevilla, aunque por el propio título de la obra "125 años de esperanto en Sevilla" ya podemos entender que su estudio abarca incluso momentos anteriores a la creación de aquel pequeño grupo de esperantistas.

Ahora te invitamos a leerlo. Si te interesa solicítalo al servicio de venta de libros de la Asociación Andaluza de Esperanto, a través del correo electrónico cordoba14@esperanto.ac. Su precio es de 15 euros, creemos que es asequible. Y lo más importante es que los siguientes cien años ya están en marcha, así que sigamos haciendo historia del esperanto en Sevilla y en toda Andalucía.



125 AÑOS DE ESPERANTO EN SEVILLA

Eldonita de Editorial Círculo Rojo.

Aŭtoroj:

Juan de Dios Montoto de Sarriá.
Manuel Ramírez Cepeda.
José María Rodríguez Hernández.
Antonio Rodríguez Gasch.

Kun prologo de José Roldán León
Prezidanto de Sevilla Esperanto-
Asocio.

310 paĝoj kaj multnombraj
fotografajoj.

Prezo: 15 €

Mendeblo ĉe Sevilla Esperanto-Asocio kaj Andaluza Esperanto-Unuiĝo
cordoba14@esperanto.ac



En el número anterior comenzamos a hablar del cuadro de voces simples. Recuerda que se trata de un cuadro cartesiano, gracias al cual, y uniendo raíces con terminaciones, surgen una cuarentena de palabras del tipo: *donde, como, allí, cuanto, por eso, de ningún modo*, etc. Son las llamadas "voces simples del esperanto".

Una de esas palabras es **TIAL**, formada por la raíz *TI* (ese, esa) y la terminación *AL* (causa). Su traducción sería algo así como "por eso, por esa causa". Por supuesto, si le añadimos la partícula aproximativa *ĉi* y formamos *ĉi tial* o *tial ĉi*, estaríamos refiriéndonos a "por esto, por esta causa". Aunque lo más habitual es nos encontremos solo con TIAL.

Veamos algunos ejemplos de uso de TIAL.

- Vi ne studas multe, tial vi ne trapasos la ekzamenon.
Tú no estudias mucho, por eso no aprobarás el examen.
- Temas pri granda defio, tial mi devos labori tagon post tago.
Se trata de un gran desafío, por eso tendré que trabajar día a día.

TI: ese, aquel

AL: causa

TIAL: por eso, por esa causa, por esa razón

TIAL indica la causa, el porqué de algo, por lo que puede considerarse que se trata de una palabra muy cercana en su significado y uso a otra que conocemos y que usamos a menudo "ĉar". Veamos el uso habitual de esta última:

- Kial vi venis en mian urbon?
¿Por qué viniste a mi ciudad?
- Mi venis en vian urbon, ĉar mi volis viziti vian domon.
Yo vine a tu ciudad porque quería visitar tu casa.

La diferencia entre *ĉar* y *tial* radica en que *ĉar* suele aparecer en el comienzo de una frase subordinada, indicando la causa de la afirmación de la frase principal.

Veamos más ejemplos:

- Mi amas ŝin, ĉar ŝi estas inteligenta.
Yo la amo porque ella es inteligente.
- Li studas fremdajn lingvojn, ĉar li deziras vojaĝi tutmonden.
Él estudia lenguas extranjeras porque desea viajar a todo el mundo.

Veamos también algunos ejemplos de uso de TIAL:

- Hodiaŭ ekpluvos, tial mi prenos ombrelon.
Hoy empezará a llover, por eso cogeré un paraguas.

Podríamos decir también:

Mi prenos ombrelon, ĉar hodiaŭ ekpluvos.

- Mi deziras viziti vian domon, tial mi vojaĝos en vian urbon la venontan semajnon.
Yo deseo visitar tu casa, por eso viajaré a tu ciudad la semana que viene.

También puede decirse:

- Mi vojaĝos en vian urbon la venontan semajnon, ĉar mi deziras viziti vian domon.

A veces podemos encontrarnos *ĉar* y *tial* en la misma frase. Por ejemplo:

- Ĉar vojaĝoj malgrandigas la mondon, tial estas necese lerni la internacian lingvon.
Porque los viajes hacen al mundo más pequeño, por eso es necesario aprender la lengua internacional.

- Ĉar li perdis sian tutan monon, tial li ne povas aĉeti novan aŭtomobilon.
Porque él perdió todo su dinero, por eso no puede comprar un coche nuevo.

Habitualmente la función de ĈAR es introducir una frase que completa la anterior, explicando la causa de aquella primera frase.

TIAL indica directamente la causa en la frase.

¿Podría sustituirse ĉar por tial? Sí, pero no es lo habitual y en caso de elegir tial, habría que decir "tial, ke..." (por eso que...)

- Mi bezonas novan aŭtomobilon tial, ke mi devas ofte vojaĝi.
Yo necesito un nuevo coche por eso que debo viajar a menudo.

En este caso incluso podríamos utilizar también "pro tio, ke"

- Mi bezonas novan aŭtomobilon pro tio, ke mi devas ofte vojaĝi.

Añadiendo la "a" final propia de los adjetivos, podemos formar también "Tiala". Veamos su uso en algunas frases.

- Se vi investas monon en nobla kaŭzo, vi atingos duoblan profiton, socio gajnos per via mono kaj vi per la tiala monprofito.
Si tu inviertes dinero en una causa noble, conseguirás un doble beneficio, la sociedad ganará con tu dinero y tu con el consiguiente rendimiento económico.

En este caso la traducción libre de "tiala" ha sido "consiguiente", sin embargo lo que se intenta expresar con su uso es que el rendimiento económico "monprofito" ha tenido esa causa "tiala" referida a la inversión de una cantidad de dinero.

POEZIA ANGULO



Antonio Machado Ruíz

Sevilo 1875 ~ Colliure 1939

Nokte, kiam mi dormadis.

Nokte, kiam mi dormadis,
mi songîs, reva fikci'!
ke fontaneto ŝpruĉadis
en la korintern' de mi.

Tra kiu kaŝa kanalo
vi venas, akv', tien ĉi,
font' de nova ekzistado
ne gustumita de mi.

Nokte, kiam mi dormadis,
mi songîs, reva fikci'!
ke abelaron mi havis
en la korintern' de mi;

Kaj l'orkoloraj abeloj
tie fabrikis kun zel'
vakson kaj dolĉan mielon
el la malnova tristec'.

Nokte, kiam mi dormadis,
mi songîs, reva fikci'!
ke ardanta sun' lumadis
en la korintern' de mi.

Ardanta, ĉar ĝi brulumis
kun la varm' el propra dom',
estis sun' ĉar ĝi prilumis
kaj incitadis al plor'.

Nokte, kiam mi dormadis,
mi songîs, reva fikci'!
ke Dio mem sin kaŝis
en la korintern' de mi.

Esperantigis: Antonio Marco Botella



NUNTEMPA VORTARO

OLIV - RIKOLTADO



Perverge faligi olivojn



Tukego
(granda tuko por renkontigi faligitajn olivojn)



Skipo de oliv-rikoltistoj
sub la mastrumado de skipestro.



Purigilo: instrumento por forigi foliojn el la olivoj.



Vergo: pere de ĉi tiu instrumento la oliv-arbo estas batata kaj la olivoj faliĝas. Lastatempe vergo povas esti aŭtomata kaj vibranta ilo.



Rastilo



Man-rastilo



Plukadi olivojn
(Rikolti olivojn ŝirante ilin de la branĉo)



Korboj kun olivoj



Stablo



Oliv-muelilo

Folioj por Praktikado

MIKROBOJ MANĜAS PLASTON

Mikroboj estas tre **etaj** vivantaj **estaĵoj**, kiuj troviĝas **ĉie**. Ili estas tro malgrandaj por esti **videblaj** per la homa okulo. Ili vivas en akvo, tero, kaj aero. Estas **milionoj** da mikroboj en la homa korpo. Kaj nun, iuj mikroboj evoluis por manĝi plaston.

En 2016, sciencisto malkovris novan mikrobon, kiu nomiĝas *Ideonella sakaiensis 201-F6*. Ĝi povas kreski sur la **speco de plasto**, kiu nomiĝas PET; efektive ĝi manĝas PET. Tiu ne estis la unua mikrobo, kiu manĝas plaston. Ekzistas aliaj, sed ili konsumas multajn **aĵojn krom** plasto. *Ideonella sakaiensis 201-F6* estas speciala, ĉar ĝi evoluis por konsumi nur plaston.

> etaj

Lo podemos traducir como "pequeños". Existe también, y quizá es más usual "malgrandaj". Ambos adjetivos "eta" y "malgranda" son sinónimos. Proviene del sufijo "-et" que se utiliza para el diminutivo de las palabras, así:

- hundo, hundeto perro, perrito.
- infano, infaneto niño, niño pequeño.
- strato, strateto calle, calleja.

En esperanto todos los sufijos y prefijos pueden actuar también como palabras independientes, si reciben el final correspondiente. De este modo si al sufijo "et" le añadimos la terminación del adjetivo "a", lo convertimos en un adjetivo cuyo significado es "pequeño". Podemos añadirle otras terminaciones, por ejemplo:

- etulo: un ser pequeño.
- etigi: hacer pequeño algo, empequeñecer.

> estaĵoj

Tenemos que recordar que el sufijo "-aĵ" concreta o cosifica lo que designa la raíz. En este caso la raíz es el verbo "esti" (ser, estar, haber). De este modo "estaĵo" podría traducirse como "lo que existe", o de una manera más libre "un ser". En el ejemplo del texto "vivantaj estaĵoj" expresa la idea de "seres vivos".

Como hemos visto con el anterior ejemplo de "-et", también podemos añadirle terminaciones a este sufijo. Así: "aĵo" podría traducirse como "cosa".

Añadido a nombres de animales, da la idea de "carne de...", es decir, el animal que indica la raíz pero hecho cosa, por ejemplo:

- porko, porkaĵo cerdo, carne de cerdo.
- kokido, kokidaĵo pollo, carne de pollo.
- ŝafo, ŝafaĵo cordero, carne de cordero.
- bovo, bovaĵo vacuno, carne de vacuno.

> ĉie

Recuerda que en el número anterior hablamos de las voces simples que se referían a lugar: TIE (allí), KIE (dónde), NENIE (en ningún lugar)... Una de estas voces sería ĈIE, cuyo significado es "en todos lados". Veamos algunos ejemplos:

- Mi trovas amikojn ĉie.
Yo encuentro amigos en todos lados.
- La urbo estas tre granda, ĉie videblas grandaj konstruaĵoj.
La ciudad es muy grande, en todos lados se ven grandes construcciones.

No es el único término para expresar la idea de que algo ocurre en todos lados, ya que también encontramos "ĉiuloke" y "tutloke". Utiliza el que más te guste, aunque por economía del lenguaje conviene decir "ĉie".

> videblaj

En este número estamos utilizando varios sufijos, en esta ocasión se trata del sufijo "-ebl", que expresa la idea de que "algo es posible". En el ejemplo "videblaj" se traduce por "visibles" (que es posible ver). Como se trata de un adjetivo termina en "a". Veamos más ejemplos de este sufijo:

- Atentu, ne trinku tian akvon, ĝi povas esti ne-trinkebla.
Ojo, no bebas esa clase de agua, puede no ser potable.
Trinki, trinkebla Beber, potable (que se puede beber).
- Tiu historio reale estas fantazio, ĝi estas tute ne-kredebla.
Esa historia realmente es una fantasía, es totalmente increíble.
Kredi, kredebla Creer, creíble (que se puede creer).

Como todo sufijo, también tendría significado de manera aislada, así "ebla" da la idea de que algo es posible. Recuerda que si lo utilizamos para definir las características de una idea expresada por un verbo, lo debemos utilizar como adverbio, terminando en "e".

- Ne estas eble lerni parkere la tutan libron.
No es posible aprenderse de memoria todo el libro.
- Konviki lin estas tute maleble.
Convencerle es totalmente imposible.

> milionoj da

Ya hemos visto en varias ocasiones el uso de la preposición "da". La utilizamos para relacionar dos palabras, expresando una de ellas una medida de la otra, por ejemplo: cantidad, peso, longitud, volumen, etc.

En el ejemplo hemos visto "milionoj da mikroboj" (millones de microbios). Así, nos encontramos con dos palabras "milionoj" y "mikroboj", expresando la primera una cantidad de la segunda. Veamos algunos ejemplos:

- Granda amaso da homoj ĉeestis la spektaklon, eble tie estis miloj da homoj.
Una gran masa de gente asistió al espectáculo, posiblemente allí había miles de personas.

En este ejemplo hemos utilizado la preposición "da" en dos ocasiones. En la primera nos referimos a una gran masa de gente, es decir estamos expresando una medida de algo, en este caso de gente, de personas. También hemos dicho "centoj da homoj", hemos indicado de nuevo una cantidad "centoj" y también lo que hemos medido "homoj".

Veamos más ejemplos:

- La Inkvizicio bruligis milojn da malpermesitaj libroj.
La Inquisición quemó miles de libros prohibidos.

- La pejzaĝo estis impona, tie videblis miloj da altaj arboj.
El paisaje era imponente, allí era posible ver miles de árboles altos.

Y si abordamos la cuestión de expresar una cantidad de cosas o de personas con "da" tendremos que tratar también el tema de "grupo de".

Hemos indicado que usaremos "da" para referirnos a una cantidad de algo, entonces ¿tenemos que utilizar también esta preposición cuando hablemos de un grupo? ¿Diríamos "grupo da amikoj"?

La respuesta es que son válidos ambos usos: "grupo de" y "grupo da". En el primero estamos destacando el hecho de que un grupo está formado por una concreta categoría de miembros "los amigos"; mientras que con "da", lo que destacamos es el número de sus componentes, es decir se trata de un grupo, esto es, no uno solo, ni una pareja, ni tampoco una gran multitud.

> Speco de plasto

Lo traducimos como "especie de plástico". Como se ha indicado en el ejemplo anterior la preposición "de" no solo hace referencia a pertenencia, sino que también alude a las características de algo. En las líneas anteriores hemos hablado de "grupo de amikoj", dando la idea de que la característica del grupo es que está compuesto por amigos. En este caso decimos "speco de plasto", dando la idea de que la característica de la especie (speco) es que está formada por plásticos (plasto).

Veamos un ejemplo donde aparece "de" y "da"

- Mamuloj estas speco de vivantaj estaĵoj, al kiu apartenas milionoj da bestoj. La plej granda grupo de mamuloj loĝas surtere. Ekzistas dekoj da subspecoj de mamuloj.

Los mamíferos son una especie de seres vivos, a la cual pertenecen millones de animales. El grupo más grande de mamíferos vive en la tierra. Existen decenas de subespecies de mamíferos.

Puede observarse en el ejemplo que cuando hemos hablado de medidas "milionoj da bestoj", "dekoj da subspecoj", hemos utilizado la preposición "da", pero cuando hablamos de características de algo, "speco", "subspeco" utilizamos "de".

Recuerda, utilizamos "da" para expresar una cantidad, una medida...

> aĵojn

Ya hemos visto antes que el sufijo "-aĵ" puede actuar de manera independiente, es decir, sin necesidad de que actúe como sufijo de una palabra. En ese caso, tan solo será necesario añadirle la terminación correspondiente. En este ejemplo le hemos añadido la terminación del sustantivo "o". De este modo "aĵo" significaría "cosa", "algo concreto". En plural sería "aĵoj" y si actúa en la frase como objeto directo aparecería en acusativo, así "aĵojn".

Veamos algunos ejemplos:

- En tiu domo ĉio estis granda ĥaoso, multaj aĵoj plenigis la ĉambrojn.
En esa casa todo era un gran caos, muchas cosas llenaban las habitaciones.

> krom

La preposición "krom" merecería un estudio más detenido, pero lo dejaremos para otro número. "Krom" puede utilizarse en diferentes situaciones, en el ejemplo que se propone en el texto "ili konsumas multajn aĵojn krom plasto", lo que se hace con "krom" es resaltar algo, en este caso la palabra "plasto".

Así, podría traducirse por: "ellos consumen muchas cosas incluso plástico". Lo que se está haciendo al usar "krom" es destacar que también nos referimos al plástico, aunque pueda haber englobado en la definición anterior "muchas cosas". Veamos más ejemplos de este uso de "krom"

- Li estas tre riĉa, li havas grandajn bienojn krom la plej granda en la lando.
Él es muy rico, tiene grandes fincas incluso la más grande del país.
- En la grupo troviĝis tradukistoj de multaj lingvoj krom la svahila kaj la tagala.
En el grupo se encontraban traductores de muchas lenguas incluso del swahili y del tagalo.



Fuente Obejuna stariĝas en la nordo de la kordova provinco, tre proksime al Ekstremadura regiono. La unua afero pritraktenda rilate ĉi tiun vilaĝon estas difini kiel, reale, ĝi nomiĝas. Sur tekstoj estas eble trovi la nomojn Fuente Obejuna, Fuente Ovejuna, Fuenteobejuna kaj Fuenteovejuna. Do, kiamaniere nomiĝas tutcerte jena vilaĝo?

La unua nomo de la vilaĝo, dum la Romia regado, estis Fons Mellaria. Tiu nomo jam rilatas al mielo, do

Blazono de Fuente Obejuna



ankaŭ al abeloj, tiel, toponimio de Fuente Obejuna memorigas al ni la ekziston de abunda abelbredado. En la 18-a jarcento, kelkaj tekstoj eĉ parolas pri Fuente Abejuna kaj sur la blazono de la vilaĝo aperas abelo. Pro tio la ĝusta nomo estas Fuente Obejuna, aperiganta la litero B, ĉar la nomo rilatas al abeloj. Tamen, kial sur kelkaj tekstoj ankaŭ aperas Fuente Ovejuna, kun litero V?

La origino de tiu nomo (Fuente Ovejuna) troviĝas sur famega verko de Lope de Vega, pritraktanta aferojn kiuj okazis en la vilaĝo en la jaro 1476. Lope de Vega konfuzis la nomojn, tiel li verkis pri Fuente Ovejuna, kun la penso, ke la nomo devenis de la hispanlingva *Oveja* (ŝafo), ne de *Abeja* (abelo). Do, oni povas diri, ke kvankam la nomo de la fama teatra verkaĵo de Lope de Vega estas Fuenteovejuna, reale la loko pri kies okazintaĵoj li verkis estas Fuente Obejuna, kvankam verdire, ambaŭ nomoj intime rilatas inter si.

Kiel dirite, Fuente Obejuna estas la romia urbo Fons Mellaria, fondita meze de la 2-a jarcento a.K., post la

tria milito inter Romo kaj Kartago. La situo de la urbo mem, sur la vojo inter la provincoj Betiko kaj Lusitania, gravigis la vilaĝon, kiu krome havis riĉajn minejojn. La urbo ja estis tre grava dum la 3-a kaj 4-a jarcentoj p.K., sed la fino de la okcidenta Romia Imperio provokis ankaŭ la preskaŭ malaperon de Fons Mellaria.

Guzmán. Rilate la kialojn de tiu ribelo kaj murdo ekzistas malsimilaj teorioj. La intrigo de la teatro-verko de Lope de Vega parolas pri perforto de junulino en la vilaĝo, fare de la komandoro, poste murdita. Sed verŝajne la ribelado ŝuldiĝis al diskutoj kaj luktoj inter povoj, tio estas, inter la milita ordeno de Kalatravo kaj la Konsilantaro de Kordova.



Islamanoj venis en la Iberan duoninsulon en la 8-a jarcento, tamen, ne multaj arabaj restaĵoj troviĝas en Fuente Obejuna, escepte de kelkaj cisternoj. Post la forpelo de la islamanoj en la 13-a jarcento, la tuta zono estas repopolita de kristanaj kastilianoj.

En la jaro 1476 okazis ribelo de la enloĝantaro de Fuente Obejuna, pri ĉi tiu okazintaĵo Lope de Vega verkis famegan teatraĵon en la jaro 1619. Laŭdire, la enloĝantoj murdis la komandonon Fernán Gómez de

Sed verdire, dank'al la verko de Lope de Vega la vilaĝo Fuente Obejuna estas diskonigita tra la tuta mondo, kune kun la dialogo de tiu teatraĵo:

- *Kiu murdis la komandonon?*
- *Fuente Obejuna, mia senjoro.*
- *Kiu estas Fuente Obejuna, do?*
- *Unuigita, la tuta popol'!*

Ekde tiam, la krio "¡Fuente Obejuna, todos a una!" (Fuente Obejuna, ĉiuj kune!) estas simbolo de popolaj ribeloj en la tuta Hispanio.

Iom post iom, dum la 17-a kaj 18-a jarcentoj, la enloĝantaro de la vilaĝo malpliigis, kelkaj apudaj vilaĝetoj, kiel Valsequillo, Los Blázquez kaj La Granjuela formis siajn proprajn municipojn. Meze de la 19-a jarcento la ekonomio de la tuta zono plifortigis, ĉefe dank'al la ekspluatado de minejoj. Tio daŭrigis ĝis la hispana milito de 1936, tiam Fuente Obejuna troviĝis ĉe milita fronto kaj la urbo estis okupita kaj reokupita de unu kaj alia kombatanta armeo.

Hodiaŭ Fuente Obejuna estas vilaĝo kun 4500 enloĝantoj, kies ĉefa ekonomia riĉo-fonto estas la terkulturo, la bruto-farmo kaj lastatempe pligraviĝis la kampara turismo.

Monumentoj

Modernisma Palaceto

Konstruita fine de la 19-a jarcento kiel domo de la S-ro Pedro Celestino Romero, nuntempe tie troviĝas la municipa turism-oficejo. Kurbaj, cirklaĵaj kaj parabolaj linioj videblas sur la fasado, ĝi estas unu el la plej gravaj modernismaj konstruaĵoj en la provinco Kordova.



Preĝejo de Nia Madono de la Kastelo



Ĉi tiu religia konstruaĵo troviĝas meze de la urbo, ĝi estas videbla el ĉiuj lokoj, pro la fakto, ke ĝi stariĝas sur la plej alta pinto de Fuente Obejuna. La ĉefaltaro, de la 16-a jarcento, estas belega, ankaŭ la ĉapelo de la Sanktejo.



Teatro-verko "Fuente Ovejuna", tie la enloĝantaro de la vilaĝo ludas kiel aktoroj



Venontnumere Turismi en ... **PURCHENA (Almerio)**

Festoj

Ĉiu du jaroj oni prezentas la teatraĵon Fuenteovejuna de Lope de Vega. La enloĝantoj mem estas la ĉefroluloj de tiu teatra prezentado. La scenejo estas la centra placo de la vilaĝo.

Alie, dum la paska dimanĉo, por festi la resurekton de Kristo, okazas tamburado, estas lanĉata art-fajraĵoj kaj junuloj flirtigas flagojn surstrate.

Gastronomio

La plej tipaj manĝaĵoj en Fuente Ovejuna devenas de ĉasaĵoj, porkaĵoj kaj ŝafaĵoj. La gusto de ĉi tiuj produktoj estas plifortigita per aromherboj, kiel timiano kaj rosmareno.

Rilate dolĉaĵojn estas tre konataj la pestiños, perrunillas kaj "gachas con tostones".




Legu librojn en aŭ pri esperanto !

Ĉi tiuj libroj estas akireblaj ĉe la libro-servo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

Kontaktu kun ni:

cordoba14@esperanto.ac



LA PANEJO

de Serĝo Elgo.

Unua novelaro de la jam fame konata romanisto.

Eldonita de Internacia Esperanto-Muzeo, 1998.

160 paĝoj. Prezo: 12 €.

PLATERO KAJ MI

de Juan Ramón Jiménez (trad. Liven Dek)

Famega poemo en prozo, en kiu la poemoj la aŭtoro, per dialogoj kun sia azeno Platero, priskribas andaluzian vilaĝon, kun ties ĉi homoj kaj lokoj.

Eldonita de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, 2009.
200 paĝoj. Prezo: 8 €.





ANTAŬ UNU JARCENTO. La granda milito kaj Esperanto.
de Javier Alcalde kaj José Salguero.

Rakontoj de esperantistoj pri la unua mondmilito kaj tekstoj pri la sinteno de la Esperanto-movado al ĝi.

Eldonita de SAT (Eldona Fako Kooperativa), 2018.

375 paĝoj. Prezo: 16 €.

LA GRAFO DE MONTE-KRISTO (2 volumoj)
de Alejandro Dumas (trad. Daniel Moirand)

Oni konsideras la libron "La Grafo de Monte-Kristo" kiel la ĉefverkon de A. Dumas.

Eldonita de Flandra Esperanto-Ligo, 2010.

1184 paĝoj Prezo: 80 €.



EL HOMBRE QUE DESAFIÓ A BABEL
de René Centassi y Henri Masson.

Traducción al español de la biografía del autor del idioma esperanto.

Edita: Liceo Madrileño de Esperanto, 2005.


334 páginas Prezo: 20 €.

LA ALKEMIISTO

de Paulo Coelho (trad. Carlos Valle)

Unu el la plej famaj verkoj de la aŭtoro. Surprizoplena aventuro tra la araba mondo

Eld. 2007 158 paĝoj Prezo: 10 €.



Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio.

Cristeto Rodríguez Aparicio

La kordova bohemio

La kordova urbodomo festas en la jaro 2023 la 150-an dat-revenon de la konstruo de la Granda Teatro de Kordovo, sendube la plej grava kaj impona kultur-centro en ĉi tiu andaluzia urbo, depost ties konstruo en la jaro 1873. La arkitekto de la Granda Teatro estis Amadeo Rodríguez. Li naskiĝis en la kastilia urbo Salamanko kaj li komencis labori en Kadizo. Poste li venis en Kordovon, tie li agadis kiel municipa arkitekto. Krom la Granda Teatro, li dezajnis la etendiĝon de la urbo tra la nuntempa bulvarde de la Granda Kapitano, tie stariĝas nun la Granda Teatro.

Filo de Amadeo Rodríguez estis Cristeto Rodríguez Aparicio. Li naskiĝis en la urbo Kadizo, poste li akompanis sian patron kiam la tuta familio translokiĝis al Kordovo. Jun-aĝe Cristeto Rodríguez, aŭ Don Cristeto, tiel li estis konata, absorbiĝis en la kultura vivo de la urbo Kordovo. Liaj deziroj scii pri ĉiuj artoj kaj sciencoj estis enormaj, li ekstudis profunde multajn aferojn, tamen



Kampanjo ekigita de la Kordova Urbodomo kun la celo memori la 150-an datrevenon de la konstruo de la Granda Teatro

verdire, li finis neniun superan studon ĉar li forkuris el ĉiuj ordoj kaj reguloj, certe li estis tipa bohemio. Li estis tre inteligenta kaj li posedis grandan memor-kapablon, pro tio li sukcesis en multaj aferoj, tamen li sin dediĉis al neniuj konkreta kaj fiksa agado.

Li estis membro de la Akademio de Nobelaj Artoj kaj Beletro de Kordovo, same li estris bonfaran asocion por helpi orfojn en la urbo. Li kunlaboris ankaŭ kun la Komerca Ĉambro de la urbo, ĉefe kiel redaktoro de ties bulteno. Vere li estis kultura kaj sindonema homo al kiu ne sufiĉis ununura kaj ekskluziva agado.

En la jaro 1901 la "Círculo de la Amistad" (Amikeca Rondo), la plej prestiĝa kultura institucio en Kordovo dum la 19-a kaj 20-a jarcentoj, inaŭguris sian bibliotekon. Tiutempe, la libraro enhavis preskaŭ 2000 ekzemplerojn, multaj el ili veraj juveloj de pasintaj jarcentoj, -nuntempe ĝi posedas pli ol 17.000 volumojn-. La unua direktoro de tiu biblioteko estis Cristeto Rodríguez, kiu lerte prizorgis kaj ordigis la tiutempan plej gravan biblioteko de Kordovo.

Ĉar kulturema homo en la komenco de la 20-a jarcento en Kordovo, kompreneble Cristeto Rodríguez ankaŭ estis esperantisto. Li multe rilatis kun Luciano Gisbert, franca profesoro en la Provinca Mezlernejo de Kordovo, kiu favorigis la instruadon de la internacia lingvo en tiu centro.

Impona biblioteko de la kultura asocio "Amikeca Rondo" en Kordovo



En la jaro 1908, Gisbert akceptis la proponon de Paul Linares, franca inĝeniero en Kordovo kaj inicianto de esperanto en ĉi tiu urbo, organizi kurson de la internacia lingvo en la Provinca Mezlernejo. Cristeto Rodríguez ĉeestis kiel lernanto al tiu kurso, poste, li fariĝis sekretario de la nova esperantista grupo starigita post la fino de la kurso. En la jaro 1911 Cristeto aliĝis, kiel membro numero 1774-a, al la Hispana Societo por Propagando de Esperanto.

Bedaŭrinde, Cristeto Rodríguez Aparicio forpasis jun-aĝe. En la monato junio 1911 li subite mortis. La kordovaj ĵurnaloj abunde informis pri la malfeliĉa novaĵo. La urbaj aŭtoritatoj publike elstarigis la figuron de ĉi tiu kulturema homo, kiu apenaŭ disponis pri sufiĉaj monrimedoj. Tiel, la urbo mem pagis la tutajn kostojn de la entombigo.



$E = mc^2$ *Scienca Angulo*

Nikotino, ĉu la nova mirakla drogo?


Nikotino estis pensita en mia kapo kiel io ĉiam kaj ĉiukaze malbona, sed kiam mi pli kaj pli lernis pri ĝi, mi pli pensis ke ne estis kiel mi kredis, ne estis kiel kutime pensite.

La nikotino estas ligita en niaj kapoj al la tabaka fumo, kaj tiumaniere al la malsamaj tipoj de kanceraj kaj aliaj malsanoj. Vere, la tabaka fumo estas la kialo de preskaŭ ĉiuj pulmonaj kanceraj kaj aliaj malsanoj, sed ne estas nikotino tio, kio mortigas la fumantojn, sed aliaj substancoj de la tabaka fumo.

Ankaŭ estis en mia kapo alia miskompreno pri nikotino: kiam mi komencis fumi mi pensis ke nikotino estis trankviliga drogo sed poste, kontraŭe al tio pensita de mi kaj de aliaj homoj, mi ekligis fumi kun sendormeco kaj pli malfrue kun pli bona ludo de la gitaro kaj poste pli bona agado en ĉiuj agoj krom en la fizika ekzercado. Fakte, kiam mi komencis maĉi nikotinajn maĉgumojn eĉ tio ekpliboniĝis kompare kun preni nenion.

Sed fakte, kio estas nikotino?


Nikotino estas alkaloido de la tabaka planto (*Nicotiana tabacum*) ĝi havas venenan agon precipe por la artropodoj sed ankaŭ havas agojn, plejparte ekscitantajn, sur la homa nerva sistemo kaj tio estos la grava afero por tiu artikolo. La nikotino pruvis sendube plibonigi la movajn kapablojn, atentigon kaj memorkapablon, komparita kun placebo en homoj.



Nikotino agas sur la homaj cerbo kaj korpo en tre malsimplaj kaj ne ĉiukonataj manieroj, sed plejparte nikotino estas antagonisto de la nikotinaj acetilkolinaj nervoricevantoj (la nervoricevanto "pensas", ke la nikotino estas acetilkolino) krom ĉe la nervoricevantoj nAChR α 9 kaj nAChR α 10, kie ĝi havas antagonistan agadon (malpermesas la ago de acetilkolino en tiuj ĉi nervoricevantoj). Oni pensas, ke tiu antagonista ago ene de tiuj du ricevantoj estas la kialo de la malforta analgezika propajo de nikotino.

aŭ eĉ eble ne estis taŭge uzita aŭ bone esplorita, tial ke ĝenerale la socio ne povas pensi pri nikotino sen pensi en la malsanoj ligataj al la tabaka fumo.

Sed kiam mi komencis skribi tiun ĉi artikolon mi malkovris ke bonŝance ne. Eĉ danke al la esplorado pri la nikotina ago sur la cerbon oni trovis kelkajn drogojn kiuj havas similajn efikojn kiel nikotino, sed aperas esti pli efikaj ol ĝi por tiu celo; la plejgrava ekzemplo estus la Acetilkolistenerazoj inhibiloj.



Nikotino kiel medikamento

Iom poste ke mi eklernis pri nikotino, mi malkovris ke nikotino provis esti utila por malpliigi la simptomojn de malsanoj kiel la Alzheimer, la parkinsona, la atentomanka-hiperaktiva perturbo (AHP) aŭ la depresio. Plejparte mi komencis skribi tiun artikolon ĉar mi volis vidi kiel veraj estis tiuj pretendoj

La acetilkolistenerazoj inhibiloj malpermesas la liberigon de la enzimo kiu malaperigas la acetilkolinon (purpuraj aĵoj ene de la bildo). Tiunmaniere estus pli da acetilkolino interneŭrone. La plej uzata medikamento por tio estus donazepilo.

La sola uzo en kiu nikotino estas la plej bona opcio estas kiel helpo por ĉesi fumi kaj tiuokaze estas la unua drogo elektita, sed nun ŝajnas ankaŭ,

ke la nikotino povus plibonigi la efikon de "levodopo" por malaperigi la parkinsonajn simptomojn.

Konkludo

Ne, nikotino ne estas mirakla drogo nek estas la plej bona opcio por tiuj diversaj celoj. La plej bona opcio por (AHP) estus amfetaminoj kaj aliaj dopaminaj agonistoj; por plibonigi la memorkapablon estus donazepilo kaj aliaj acetilkolistenerazoj inhibiloj; por la depresio estus aliaj pli uzataj medikamentoj, sed por la parkinsono ankoraŭ daŭras la esploro.

La kialo de mia intereso pri nikotino estas ke ĝi aperas kiel permesita drogo por aĉeti ĉiumonde, kaj mi volus diskuti ĉu la agado de niaj registaroj -kiuj permesas aŭ malpermesas la vendadon de kelkaj substancoj- estas etika, sed tiu estus temo por alia artikolo.

Nikotino povas esti ilo por plibonigi la mensan kapablon kaj energio de homoj kiel ekzemple kafeino, sed en iomete malsimila maniero; kaj kiel kafeino ne estas tute danĝero-esceptita.

Ángel García del Río





Sendube la *toná* estas la plej antikva flamenka kant-stilo, kvankam nuntempe preskaŭ neniu kantisto ludas ĉi tiun kantaĵon. Temas pri kantado sen muzik-instrumenta akompanado, tio estas, ne aŭdeblas gitaro en ĉi tiu kantaĵo.

La deveno de ĉi tiu kant-stilo troviĝas en la antikvaj baladoj, strofaj versaĵoj rakontantaj dramon. El la antikva *toná* aperis aliaj kantaĵoj, kiel *martinete* kaj *carcelera*. La ĉefa karakterizaĵo de ĉi tiuj stiloj estas la fakto, ke neniu muzik-instrumento akompanas la voĉon de la kantisto.

Tiel, *martinete* estas la tipa kantaĵo de forĝistoj, tie apud la voĉo de la kantisto nur aŭdeblas la monotona martelado de la forĝisto, tamen tio, verdire, ne estas muzik-instrumento. Rilate al la *carcelera*, temas pri la kantaĵo de malliberigito, plendanta pro ties kondamno.

Rilate la unuajn sciaĵojn pri *toná*, en la 18-a jarcento en la urbo Jerezo, Tío Luis el de la Juliana estas konsiderata kiel la unua kantisto kiu ludis pere de ĉi tiu stilo. Dum la 19-a jarcento estis ofte aŭdi ĉi tiujn kantaĵojn en



Antonio Mairena
1909 - 1983

flamenkaj etosoj, tamen en la jaro 1830 novaj stiloj aperas, kiel *segurriyas*, tie la kantistoj apogas sin sur gitar-ludado. Okaze de la unua konkurso pri flamenko, organizita en Granado en la jaro 1922, unu el la stilo proponitaj estis la *toná*.

El historia vidpunkto, ekzistas tiom da *toná*-stiloj kiel kantistoj ludantaj ilin. Tamen, fakuloj pri flamenko asertas, ke vere ekzistas tri *toná*-stiloj, la *toná* granda, la *toná* malgranda kaj la *toná* de Kristo. Ni vidu kelkajn ekzemplojn pri ili:

Toná granda.

Antonio Mairena kantas:

*Mi vin ne devigas, ciganin'
ami min kontraŭ via koro,
se vi tion ne deziras
agu ĉiam laŭ via volo.*

<https://www.youtube.com/watch?v=wit9WNvWJNI>
de 00:00 ĝis 01:40 minuto.

Kristana Toná

Tomás Pavón kantas:

*Ho, pastro de animoj
kaj ministro de Kristo
Trunko de nia sankta eklezio
kaj arbo de la paradizo.*

<https://www.youtube.com/watch?v=h8ou8C474Io>
de 00:00 ĝis 00:33 minuto.

"La flamenka arto estas filozofio,
pens-maniero kaj sento de popolo
kaj ties historia tradicio."


Manolo Sanlúcar.

Toná malgranda.

Tomás Pavón kantas:

*Ĝis l'olivarbaro ĉe l'valo
mi akompanis amikinson
mian brakon surmetis mi sur ŝin,
mi rigardis ŝin kiel fratinnon.*

https://www.youtube.com/watch?v=5TqUofrZn_Y
de minuto 02:08 ĝis fino.





Fervojista Angulo

La unua elektra fervoja linio en Andaluzio

En la jaro 1866 ekfunkciis fervoja linio de la kompanio MZA inter Manzanares (provinco Toledo) kaj Kordovo. Pro tio, tiu kompanio konstruis stacidomon meze de du gravaj vilaĝoj en la provinco Jaeno, tio estas: Linareso kaj Baezo. Unuamomente la nomo de tiu stacidomo estis "Baeza Empalme" (Kuniĝo de Baezo), poste ĝi ricevis la nomon "Stacidomo de Linares-Baezo". Ĉirkaŭ ĝi stariĝis vilaĝeto ankoraŭ ekzistanta kun tiu sama nomo.

Pro la fakto, ke ĉi tiu stacidomo troviĝis nek en Linareso, nek en Baezo, oni planis komuniki ambaŭ vilaĝojn kun tiu nova stacidomo. Naskiĝis tiam, la projekto starigi la fervojan linion de "La Loma", pro la nomo de la regioneto kie troviĝas ĉi tiujn vilaĝojn en la provinco Jaeno.

La unuan pripensitan fervojan linion por komuniki Baezo kaj la stacidomo Linares-Baezo oni adoptis en la jaro 1890, tiam oni decidis plilongigi la linion ĝis la urbo Ubedo. Tial, oni decidis konstrui ne tro larĝan relinon, nur 600 milimetroj estus sufiĉaj

anstataŭ la kutimaj 1660, larĝeco de la hispanaj reloĵoj. Certe, ne estis necese tro longa vagonaro, ĉar la distanco apenaŭ estis dudeko da kilometroj. Fine, ĉi tiu projekto ne sukcesis, ne nur pro ekonomiaj malfacilaĵoj, sed ankaŭ pro la fakto, ke aliaj vilaĝoj, kiel Villacarrillo, petis kroman plilongigon de la nova linio.

Ĉi tiu linio uzis elektrajn tramrelojn, poste oni konstruis pliajn liniojn kiuj komunikis ankaŭ proksimajn vilaĝojn, kiel Rus kaj Caneno. Ĉu ĉi tiuj linioj estis fervojaj aŭ tramaj? Nu, verdire ili aspektis similaj al tramoj, tamen la tramvojo ne trakuris urbon, sed ĝi utilis por komuniki vilaĝojn, do, same kiel vagonaro sur fervojo.



Elektra fervoja linio inter Ubedo kaj la stacidomo Linares-Baezo. Jaro 1964

En la jaro 1905 alia nova projekto aperis. En tiu jaro stariĝis la Societo por la Konstruo de Elektra Tramo de La Loma. La celo de ĉi tiu nova socio, en kiu la ĉefaj investantoj estis altrangaj hispanaj politikistoj, estis la ekfunkciigo de fervoja elektra linio inter Ubedo kaj la stacidomo Linares-Baezo. La projekto realiĝis en la jaro 1907, pere de ĝi elektra fervojo komunikis Ubedon kaj Baezon kun la stacidomo Linares-Baezo, krome ankaŭ ebligis komunikon kun la tramoj de la urbo Linareso.

En la jaro 1936, RENFE, tio estas la nova hispana fervoja kompanio, administris la linion, kiu fine malaperis en la jaro 1966, tiam aŭtomobiloj jam plenigis la vojojn kaj fervojoj ne utilis por komuniki urbojn kiuj troviĝis je dudeko da kilometroj.

Bedaŭrinde, la malapero de ĉi tiu unua elektra fervoja linio en Andaluzio lasis sen vagonaroj al tiu zono de la provinco Jaeno, la regioneto La Loma.



nun ni

junulara paĝo



AJEU (Andaluzia Junulara Esperanto-Unuigo) es el proyecto con el que se pretende organizar una sección juvenil del movimiento esperantista en Andalucía. Se trata de una idea que queremos hacer realidad y para eso tenemos que contar con todos los esperantistas andaluces menores de 35 años. Los objetivos de esta futura asociación básicamente son los de agrupar a todos los jóvenes esperantistas andaluces y organizar, en la medida de nuestras posibilidades, actividades principalmente recreativas que nos ayuden a perfeccionar el conocimiento del idioma internacional, así como a difundirlo en Andalucía. En un primer momento hemos pensado en actividades tales como:

- organización de excursiones a lugares de interés en Andalucía.
- Participación en encuentros juveniles esperantistas en el extranjero.

Si te interesa el proyecto contacta con nosotros, no es necesario pagar cuota alguna. El primer paso será conocer cuántos esperantistas andaluces son menores de 35 años y tienen ganas de asociarse para pasarlo bien gracias al idioma internacional. Por eso te invitamos a que contactes con nosotros a través del correo ajeu@esperanto.ac y a que propongas las ideas que creas más interesantes para este nuevo proyecto.


Se vi estas juna (-35 jaraĝa) kaj vi deziras aliĝi al andaluzia E-asocio specife por gejunuloj, AJEU estas inda projekto por kunlabori. Kontaktu kun ni pere de la adreso: ajeu@esperanto.ac Kaj ne forgesu proponi tion kion vi konsideras interesa por la andaluzia esperantista junularo.

nun ni

junulara paĝo

AMIKUMU, kio estas tio?

Amikumu estas aplikaĵo (apo) por telefonoj, per kiu oni povas trovi kaj kontakti proksimajn parolantojn de konkreta lingvo. Unue ĝi estis pripensita por kontaktigi esperantistojn, tamen baldaŭ oni aldonis aliajn lingvojn, do, uzanto mem de la apo povas elekti kiujn homojn (pere de konkreta lingvo) oni deziras kontakti.



La apo lanĉiĝis por esperantistoj en la monato aprilo 2017. Ĝi estis pripensita de du esperantistaj informadikistoj, Chuck Smith kaj Evildea. Fine de la jaro 2016 ili lanĉis mon-kolektadon, kies celo estis atingi 8500 eurojn. Post 27 horoj tiu monkvanto jam estis atingita!

Kvankam unuamomente, la aŭtoroj celis kontaktigi apudajn aŭ proksimajn esperantistojn, ili baldaŭ plivastigis la nombron da lingvoj. Nuntempe la plej parolata lingvo en Amikumu estas la angla, poste esperanto, hispana, franca kaj germana. Entute, ĝis nun ezistas uzantoj de ĉi tiu apo en pli ol 700 lingvoj, inter ili, ekzemple, de la latina lingvo.


Rilate esperanton, 17.000 homoj en la tuta mondo uzas ĉi tiun apon. La bazaj funkcioj de la aplikaĵo estas senpagaj, kvankam oni povas fariĝi ora membro por ekhavi pli da funkcioj.

Pere de AMIKUMU oni povas trovi, kaj koni, parolantojn de la lingvo de vi elektata, kiuj troviĝas apude aŭ proksime. Uzanto povas mesaĝi aliajn uzantojn, sendi bildojn, sonregistraĵojn kaj map-lokojn. Do, renkontiĝoj inter parolantoj povas esti tuj organizataj kaj eble eĉ havi dumvivajn amikojn.

Kiel elŭti Amikumu-n? Nu, serĉu "Amikumu" en la apo-vendejo de via telefono -ekzemple ĉe Play Store-. Memoru, ke temas pri tute senpaga apo. Se vi havas problemojn rilate la elŭton vi povas kontakti kun www.amikumu.com.

Jen la nekredbla historio de la sciencisto kiu eniris en sian

Duan Infan-aĝon!



Ĉi tiu historio komenciĝis antaŭ unu jaro. Tiam mi laboris kiel helpantino en la laboratorio de la fama D-ro Johan' Klajton.

Doktoro, ĉi tio estas stranga. Ĉi tiu kobajo aspektas pli juna ol hieraŭ.



F-ino Klein, eble mi sukcesis. Verŝajne mi haltis la oldiĝon de la vivaj estaĵoj.

Do, se la formulo estas aplikata al homoj...



Jes, vi pravas, se la formulo estas aplikata al homoj, ni neniam maljuniĝos!

Mi rigardis atente la vizaĝon de la doktoro, kiam li klarigis al mi sian teorion. Malgraŭ la fakto, ke li jam ne estis juna, li estis bela.

La molekulo de mi uzita en la eksperimento haltigas oldiĝon de la ĉeloj. Iom post iom, ĉiuj ĉeloj en la homa korpo fariĝas pli kaj pli junaj.



Kial vi ploras Betti?



Ĉar mi amas vin, Johan'. Ekde kiam mi alvenis en ĉi tiun laboratorion.

Ĝuste tiam, li proponis ion...

Se mi enirigas en mian korpon tiun molekulon, mi haltigos mian maljuniĝon.



Subite, la doktoro prenis mian manon.

Betti... F-ino Klein, ni konas nin de antaŭ multaj jaroj kaj mi konfesas ke mi amas vin!



Ĉu? Doktor'

Jes! Certe, Betti, mi enamiĝis en vin!



Ho! Johan'

Tamen, mi estas multe pli aĝa ol vi, mia kara Betti.



Tio tute ne gravas!

Ne, kiam mi estos 70-jaraĝa, vi apenaŭ estos 30-jara junulino. Mi estas multe pli aĝa ol vi. Mi devas solvi tiun diferencon.



Ne, Johan' ne diru tion!

Tiun nokton, kiam mi eliris el la laboratorio, mi estis la plej feliĉa virino en la mondo. Male, la Doktoro estis preta daŭrigi sian eksperimenton.



Mi komencos per 10-centilitra vakcino, tio ja sufiĉos.

La sekvantan matenon, io stranga okazis.

Kia strangaĵo! Mi aspektas dek jaroj pli juna ol hieraŭ.



Post la injekto la Doktoro ŝajnis esti dek jaroj pli juna.

Johan', kio okazis? Mi ne komprenas.

Verŝajne, la molekulo ne nur haltis oldiĝon. Mi rejuniĝos!



Mi vidis, ke liaj brakoj estis similaj al tiuj de junulo.

Mi estos tiel juna kiel vi.

Tio tute ne gravas, mia kara!



Alia plia injekto kaj ni estos la perfekta paro.

Kara, ne pliaj injektoj. Mi timas.



Fine, li komprenis ĉion

Mi uzis grandan kvanton da molekuloj. La procezo pri oldiĝo invertiĝis!



Ĉu tio povus okazi? Ĉu anstataŭ haltigi mian oldiĝon mi rejuniĝos?



Do, mi povus denove havi similan aĝon al tiu de Betti! Tiel, ni ambaŭ povus esti samjaraĝaj!



Sed, la doktoro injektis al si novan dozon de la molekulo kaj li aspektis eĉ pli juna ol antaŭe.

Ekde nun vi estas geedzoj.

Mia kara Johan'!

Mia edzino



Dum la miel-monato li vekis min maltrankvile.

Betti, rigardu min! Mi aspektas pli kaj pli juna.

Bonvolu, Johan' ne injekti al vi pliajn dozojn!



Dum la sekvantaj semajnoj Betti estis tre okupata pro la baldaŭa geedziĝo. Do, ili apenaŭ havis ŝancon renkontiĝi.

Kara!

Sed...



Sed... kiu vi estas?

Mi estas via amato, sed pli juna.



Mi jam haltis la eksperimenton tuj post la geedziĝo, sed la rezulto ne haltiĝis.

Johan', mi komprenas nenion!



Ve! Mi kredas, ke mia korpo mem multoblis la efikon de la molekulo, tiel mi pli kaj pli rejuniĝos, ĝis mi ne scias kiam...

Ho! Johan' kaj kio okazos?



Dum la sekvantaj semajnoj la koŝmaro daŭriĝis, Johan' aspektis pli juna, tagon post tago.

Johan' vi aspektas 20-jaraĝa. Faru ion!

Neion, mi povas fari nenion !!



Ni kune laboris en la laboratorio por trovi rimedon al tiu stranga procezo.

Provu per kirurgia operacio!

Tio mortigus min.



Ĉiuj novaj pruvoj estis sen-sukcesaj, mia edzo pleie rejuniĝis.

Kara, vi ŝajnas esti studanto en universitato.



Ĉiutage aperis nova surprizo.

Betti, mi jam ne bezonas razi min!

Ĉu ĉi ĉio iam finiĝos?



Okazis baldaŭ, ke mi ellitiĝis apud 10-jara infano.

Johan' ĉu vi iros labori en la laboratorio?

Kio estas laboratorio?



Tagon post tago, mi vidis, kiel la eminenta doktoro Klajton fariĝis etulo.

Mi iros butikumi, mi revenos baldaŭ.

Nu, panjo ĉu vi aĉetos ludilon?



Ludiloj estis lia plej grava ŝat-okupo



Kaj poste la lud-blokoj



Pro la rejuniĝo li, iom post iom, forgesis ĉion kion li lernis antaŭe.

Ho! Kiaj belaj boteloj ili estas multkoloraj!

Ho, mia kara!



Kaj subite, li demandis ion, tio terurigis min.

Betti, vi estas mia panjo, ĉu ne?

Jes, mia kara, mi estas via panjo.



Li eĉ vekigis dumnokte ĉar li deziris trinki lakton el suĉ-botelo.



Jen mia terura historio. Sur miaj brakoj estas la homo kiun mi edzigis. Li estis eminenta sciencisto kaj nun li estas suĉanta bebo. Mi ne scias kiel finiĝos ĉi ĉio. Ĉu iu povas helpi min??



FINO



Andaluza Kuirarto

Farunaĵo kun frititaj pan-pecetoj

Unu el la plej tipaj receptoj en Andaluzio, ellaborita dum la festoj de la 1-a kaj la 2-a de decembro, estas farunaĵo kun frititaj pan-pecetoj. Temas pri bongusta dolĉaĵo, ellaborita en Andaluzio dum tiuj tagoj kiam forpasintoj estas memorataj. La recepto ja estas vere antikva, tiel, ĝi aperas en la libro pri al-andalusa gastronomio, verkita de la araba Ibn Razin al-Tuyibi (1227-1293). Do, kvankam ĉi tiu deserto estas tipa de kristina festo, verdire ĝi devenas de arabaj epokoj.

Jen la ingrediencoj por ses homoj:

- Oliv-oleo.
- Faruno (1 glaso).
- Citrono, nur ties ŝelo.
- Lakto (3 glasoj).
- Akvo (2 glasoj).
- Anizo (grajnoj).
- Sukero (3 kuleroj).
- Distranĉita pano.
- Anizo (alkohola trinkaĵo).
- Cinamo.
- Salo.



Faruno



Citrono (ŝelo)



Salo

Lakto



Oliv-oleo



Akvo



Anizo (grajnoj)



Sukero



Distranĉita pano



Anizo (alkohola trinkaĵo)



Cinamo

Kaj jen la preparado:

- 1) Ni verŝas oliv-oleon sur la paton. Ni varmigas ĝin.
- 2) Metu la pan-pecetojn sur la varman oliv-oleon ĝis la fritigo de la pano. Eltiru la pan-pecetojn frititajn, lasu ilin sur kuir-papero, tiel ili perdos superfluan oleon.
- 3) En tiun saman paton, kun iomete da oliv-oleo, metu la ŝelon de la citrono kaj la grajnoj de anizo.
- 4) Tuj aldonu farunon. Ekmovu konstante la tutaĵon, ĝis kiam la faruno aperos ekrostita.



5) Aldonu akvon, lakton, salon kaj cinamon. Daŭrigu la konstantan movadon de la tutaĵo. Evitu la aperon de grumeloj. Se aperas grumeloj, agitu rapide la tutaĵon por eviti ilin.

6) Kiam la tutaĵo aspektas densa kaj kompakta, aldonu sukeron kaj verŝu iomete da anizo (alkohola trinkaĵo).

7) Removu ĉion konstante ĝis la apero de bobeloj.



Prezentado de la kuirajaĵo:

Verŝu la paston ene de teleroj, prefere bovloj el bakita tero. Aldonu sur la supra parto de la pasto la frititajn pan-pecetojn.

Pulvoro disŝutu cinamon. Oni povas prezenti la deserton varman aŭ malvarman, laŭ via prefero.



BONAN APETITON !



Okaze de vizito al tombejo de la sevila vilaĝo Utrero, aperas ege videbla antikva tombo, sendube unu el la plej antikvaj kaj famaj en tiu tombejo. Temas pri la sepultejo de la Doktoro Pastor Pastor y Pastor. La tombejo elstariĝas inter tiuj apudaj pro ties alta monolito, tie amikoj de la forpasinta doktoro gravuris jenan tekston en la hispana lingvo: "Je la doktoro Pastor Pastor y Pastor, iliaj amikoj". Sed, kiu li estis?

Meze de la 19-a jarcento ne ĉiuj vilaĝoj disponis pri bona kuracisto por prizorgi la sanon de la enloĝantaro, preskaŭ ĉiuj ili loĝis en ĉefurboj, tie li povis gajni sufiĉe da mono. La doktoro Pastor loĝis en Utrero, vilaĝo je 30 kilometroj de la urbo Sevilo. Tie li atingis admiron de la utreranoj por la fakto, ke li priantis zorgeme malsanulojn dum kruela epidemio de ĥolero en la jaro 1854.

Li ankaŭ partoprenis en la kultura vivo de la vilaĝo, ĉefe el scienca vidpunkto. Tiel, li analizis la akvojn, supozeble miraklajn, kiuj ŝprucis el fono apud preĝejo en la vilaĝo.



Tombejo de la Doktoro Pastor en Utrero

Doktoro Pastor forpasis jun-aĝe, iliaj amikoj kovris la kostojn de la tombejo, tiel oni starigis apud la tombejo monoliton, iamaniere simila al egiptaj obeliskoj. Tamen, tuj post la forpaso de la doktoro aperis demando, ĉu li reale forpasis? Nu, ni konu ĉi tiun misteran legendon.

Tuj post la morto de la kara doktoro Pastor, trakuris la urbon onidiraĵo, laŭ kiu li ne mortis en tiu momento. Sciate, ke li suferis je katalepsio, en tiu epoko, la kelktempa senmoveco de la malsanuloj estis konfuzita kun lia forpaso. Do, multaj homoj opiniis, ke doktoro Pastor reale ne mortis en tiu momento, li nur suferis simptomojn de katalepsio.

Laŭdire, kvankam tio ne estas tute certigita, venis en la tombejon kelkaj kuracistoj de Sevilo, post la malfermo de la ĉerko, ili konstatis, ke ekzistis perungaj grataĵoj ene de la ĉerko. Do, verŝajne la doktoro Pastor ne mortis kaj li estis entombigita ankoraŭ viva.

Kompreneble, ĉi tiu estas nur legendo pri io kio, eble, okazis, meze de la 19-a jarcento. De antaŭ kelkaj jaroj, tiu loko estas grava por tiuj kiuj deziras kontakti kun aliaj post-mortaj spacaj dimensioj.

Tamen, tio kio ja estas vera, estas la fakto ke Doktoro Pastor estis omaĝe agnoskita de la urbo Utrero pro sia bonfareco. Nuntempe, centra strato de la urbo ricevis lian nomon, krome tiu malgranda obelisko en la tombejo memorigas al ni homon kiu praktikis sian sciencan por helpi aliulojn.

LA VENONTA NUMERO DE GAZETO ANDALUZIA ENHAVOS KOMPLETAN RAPORTON PRI LA 81-A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO, KIU OKAZIS EN SEVILO EN LA MONATO OKTOBRO 2023



EN EL PRÓXIMO NÚMERO DE GAZETO ANDALUZIA APARECERÁ UN REPORTAJE COMPLETO DEL 81º CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO, QUE TUVO LUGAR EN SEVILLA EN EL MES DE OCTUBRE DE 2023

Vorto-Ludoj



Krucvorto

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ
1									
2						■			
3									■
4			■						
5									■
6				■				■	
7		■							

HORIZONTALALE


1. (akuzative) Leĝa agnosko kaj reguligo de la nepagipovo de ŝuldanto.
2. Ekskrementa likvo, elfiltrata el la sango fare de la renoj kaj eliminata el la korpo. ■ (sen la lasta vokalo) Mamulo kun tre longaj membroj, trifingraj kaj fortaj ungegoj, kiu vivas pendante kaj malrapide grimpante sub arbobranĉoj.
3. (adjektive, plurale kaj akuzative) Koncentrita alkala solvaĵo de kalia aŭ natria karbonato, uzata por purigi, plankojn, malnovajn meblojn kaj simile.
4. (inverse) Sufikso esprimanta pasivon por ankoraŭ ne okazinta procezo. ■ (sen la lasta vokalo) Vaganta islama monaĥo.
5. (Verbo en prezenca tempo) Eligi iun aŭ ion pere de rita ago aŭ de ia neracia, nerezistebla logo.
6. Patriarko konstruinta de la arkeo laŭ la Biblio. ■ (sen la lasta vokalo) Aŭdebla aervibrado. ■ Sur la italaj aŭtomobiloj.
7. Simila al nul. ■ (plurale kaj akuzative) Granda afrika mamulo.

VERTIKALE

- A. Perioda, ne ĉiam regule aperanta informilo.
- B. Mallarĝa areo ĉirkaŭ punkto aŭ centro.
- C. (inverse kaj sen la lasta vokalo) Interno, meza parto de io, rigardata kiel la plej sekreta aŭ intima. ■ (sen la lasta vokalo) Natria klorido, senkolora, kristala, solvebla substanco, uzata por gustigi nutraĵojn.
- Ĉ. Speco de ĉelo, troviĝanta ĉe diversaj celenteruloj, kiu je tuŝo elsendas eksteren bruluman likvon tra kava hareto. ■ Sur la hispanaj aŭtomobiloj.
- D. Ĉiu el tiuj pecoj de la brustoparto de jako, mantelo kaj simile, kiuj estas normale refalditaj kaj kelkafoje prezentas alian ŝtofon aŭ koloron, ol la cetero de la vesto.
- E. Ronda vokalo. ■ (akuzative) Frota ekscitilo por kordvibrado, konsistanta el maldika ligna stango, laŭlonge de kiu estas fiksita fasko el ĉevalharoj aŭ alia materialo, streĉita ekde la pinto ĝis la kalkano.
- F. Insulo situanta sud-oriente de kontinenta Ĉinio, secesiinta disde Ĉinio en 1949.
- G. (inverse) Ago de io, kio malrapide malsupreniĝas aŭ falas. ■ Pluralo.
- Ĝ. Partikulo, esprimanta, ke oni malakceptas aŭ rifuzas ideon. ■ Ĉapelita konsonanto. ■ (sen la lasta vokalo) virino.

SOLVOJ AL LA PASINTA KRUCVORTO

K	R	I	S	T	A	N	O
E	O	L	O	■	L	O	■
S	T	U	D	E	N	T	O
T	E	S	A	L	O	N	O
E	N	T	R	E	■	E	R
T	O	R	O	N	T	■	T
O	N	A	M	■	I	N	E
J	O	N	A	L	E	■	M



Konstruu la lingvan piramidon el supre. Tio estas, trovu la literon kiu devas situi sur la pinta parto. Poste, aldonu unu plian literon por formi novan vorton sur ĉiu linio, laŭ la difino proponata.



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio. Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi

La Asociación Andaluza de Esperanto es la organización que tiene como objetivo difundir la lengua internacional esperanto en Andalucía. Se fundó en el año 1984 gracias a la iniciativa de esperantistas de las provincias de Málaga, Sevilla y Córdoba. Hoy pertenecen y colaboran con AEU esperantistas de toda Andalucía y también de fuera de ella.

Estraro

Prezidanto / Presidente:
Vicepresidente / Viceprezidanto:
Sekretario / Secretario:
Kasisto / Cajero:
Voĉdonantoj / Vocales:

Directiva

Ángel Arquillos López
Fátima Jiménez García
José M^a Rodríguez Hernández
M^a Dolores Torres Mateo
Jordi Lietor López
Juan García del Río
Carlos Spinola
Alejandro Burgos Escalante
Juan Díaz Casado

Poŝta adreso / Dirección Postal: C/ Ánfora 6 5º D 29013 Málaga (Hispanio)
TTT-paĝo / Página web: www.esperanto.ac
Tvitero / Twitter: @AndaluzioEO

Aliaj adresoj de la E-movado / Otras direcciones del movimiento esperantista:

Federación Española de Esperanto: www.esperanto.es
Asociación Universal de Esperanto: www.uea.org





*Nova libro eldonita en
Andaluzio !*